

凡 伊 瓜 傻

IVAN LA MALSAGULO

(注释世界语读物)

中国报道社

LEO TOLSTOJ

Ivan la Malsaĝulo

Esperantigis
V. A. ŠRIKOV

Klarigis
ILIN

EL POPOLA ĈINIO

傻瓜伊凡

(注释世界语读物)

中国报道社出版
北京百万庄路24号
中国国际书店总发行
外文印刷厂印刷

•

开本787×1092 1/32
1980年第一版
1980年7月第一次印刷
1981年1月第二次印刷
书号: 9050-Ⅱ-002
定价: 0.35元

IVAN LA MALSAĜULO

LA RAKONTO DE IVAN LA MALSAĜULO

KAJ DE LIAJ DU FRATOJ SIMONO LA
SOLDATO KAJ TARAS LA DIKULO; KAJ DE
LIA MUTA FRATINO MARTA; KAJ DE LA
MALJUNA DIABLO KAJ LA TRI DIABLETOJ.

I

Antaŭ longa longa tempo, en iu provinco de iu lando estis riĉa kamparano, kiu havis tri filojn: Simono la Soldato, Taras la Dikulo, kaj Ivan la Malsaĝulo, krome senedzan filinon, Marta, kiu estis muta kaj surda. Simono la Soldato iris al milito por servi al la reĝo; Taras la Dikulo iris al komercisto en urbo por fari komercon, kaj Ivan la Malsaĝulo restis hejme kun la fratino, kaj kulturis la teron ĝis lia dorso kurbiĝis.

Simono la Soldato akiris altan rangon¹ kaj bienon, kaj edziĝis kun la filino de nobelo. Lia salajro estis granda kaj lia bieno estis granda, kaj tamen liaj elspezoj ne kovriĝis². Kion la edzo gajnis lia sinjorino edzino malŝparis³, kaj ili neniam havis monon sufiĉe.

¹ alta rango 高级 (军官或官员)

² elspezoj ne kovriĝis 入不敷出

³ malŝpari, mal-ŝpari 浪费

Tial Simono la Soldato iris al sia bieno por kolekti la enspezon⁴, sed lia intendantato diris, “De kie do venas ia enspezo? Ni ne havas bovojn, nek ilojn, nek ĉevalojn, nek plugilon, nek erpilon. Ni devas unue pretigi ĉiujn ĉi tiujn kaj tiam la mono venos.”

Tiam Simono la Soldato iris al la patro kaj diris: “Patro, vi estas riĉa, sed donis al mi nenion. Dividu kion vi havas, kaj donu al mi trionon, por ke mi povu plibonigi mian bienon.”

Sed la maljunulo diris: “Vi portis nenion en mian domon; kial mi devas doni al vi trionon? Tio estus maljusta al Ivan kaj al la fratino.”

Sed Simono respondis, “Li estas malsaĝulo; kaj ŝi estas muta kaj surda; per kio la havo⁵ povas esti utila al ili?”

La maljunulo diris, “Ni do vidos kion Ivan diros pri ĝi.”

Kaj Ivan diris, “Li prenu kion li volas.”

Tial Simono la Soldato prenis sian parton el la havaĵoj de la patro kaj formovis ĝin al sia bieno, kaj foriris por denove servi al la reĝo.

Taras la Dikulo ankaŭ kolektis multan monon, kaj edziĝis kun la filino de komercisto, sed li deziris ankoraŭ pli multe. Tial li ankaŭ venis al la patro kaj diris, “Donu al mi mian parton.”

Sed la maljunulo ne volis doni al Taras, kaj diris, “Vi portis nenion ĉi tien. Ivan gajnis ĉion kion ni havas en la domo, kaj kiel ni povus malbone trakti lin kaj la fratino?”

Sed Taras diris, “Kion li bezonas? Li estas malsaĝulo! Li ne povas edziĝi, neniu edziniĝus kun li; kaj la muta fratino ankaŭ bezonas nenion. Nu Ivan!” li diris, “donu al mi duonon de la greno; mi ne volas la ilojn, kaj el la dombestoj

⁴ en-spezo 收入 kolekti la enspezon 意为收租，或搜集农产品。

⁵ havo 指财产

mi prenos nur la nigran virĉevalon, kiu estas senutila al vi por terkulturo.”

Ivan ridis kaj diris, “Prenu kion vi volas. Mi laboros por gajni pli.”

Tial ili donis dividon ankaŭ al Taras; kaj li forportis la grenon al la urbo, kaj prenis la nigran virĉevalon. Kaj Ivan estis lasita kun maljuna ĉevalino⁶, kaj devis labori kiel antaŭe, kaj nutri la patron kaj la patrinnon.

II

Nu, la maljuna Diablo estis ĉagrenita de tio, ke la fratoj ne kverelis pro la divido, sed disiĝis en paco⁷; kaj li alvokis tri diabletojn.

“Rigardu,” li diris, “jen estas tri fratoj: Simono la Soldato, Taras la Dikulo kaj Ivan la malsaĝulo. Ili devas kvereli, sed ili vivas pace kaj en plena harmonio⁸. La Malsaĝulo Ivan tute malbonigis la aferon por mi⁹. Nun vi tri iru kaj kroĉigu al¹⁰ tiuj tri fratoj, kaj ĝenu ilin ĝis ili fine grimacos per la okulo¹¹ unu kontraŭ la alia. Ĉu vi pensas, ke vi povas fari tion?”

“Jes, ni faros tion,” ili respondis.

“Kiel do vi komencos tion?”

⁶ Ivan estis lasita kun maljuna ĉevalino. 伊凡只剩下一匹老母马了。

只留给伊凡一匹老母马。

⁷ dis-iĝ-i, disiĝi en paco 平平安安地分了家。

⁸ en plena harmonio 在充分和谐中（生活）。

⁹ malbonigi la aferon por mi 把我的事情搞坏了。坏了我的事。

¹⁰ kroĉigi al 不离开，附着，钉着。

¹¹ grimaci per la okulo 挤眉弄眼表示轻视对方。

“Nu,” ili diris, “unue ni senriĉigos ilin¹². Kaj kiam ili havas nenion por manĝi, ni kunigos ilin en unu sama loko¹³, kaj tiam ili sendube komencos kverelon!”

“Tio estas belega¹⁴; mi vidas, ke vi komprenas vian aferon. Iru, kaj ne revenu antaŭ ol vi malpacigos ilin, alie mi senhăutigis vin¹⁵!”

La diabletoj foriris en marĉon, kaj komencis konsideri kiel komenci la taskon. Ili disputis kaj disputis, ĉiu dezirante la plej facilan laboron; sed fine ili decidis fari lotojn pri tio, al kiu el la fratoj ĉiu diableto kroĉiĝu. Se unu diableto finos sian taskon antaŭ ol la aliaj, li devas veni kaj helpi ilin. Tial la diabletoj faris lotojn, kaj difinis tempon renkonti refoje en la marĉo por informiĝi pri tio, kiu sukcesis kaj kiu bezonas helpon.

La difinita tempo venis¹⁶, kaj la diabletoj renkontis refoje en la marĉo kiel promesite. Kaj ĉiu komencis rakonti, kiel staras la afero¹⁷. La unua, kiu revenis de Simono la Soldato, komencis: “Mia afero iras bone. Morgaŭ Simono revenos al la domo de sia patro.”

Liaj kamaradoj demandis, “Kiel vi aranĝis tion?”

“Unue,” li diris, “mi faris Simonon tiel maltima, ke li proponis konkeri la tutan mondon por la reĝo¹⁸; kaj la reĝo faris lin generalo kaj sendis lin por batali kontraŭ la reĝo de Hindujo. Ili renkontis por batali, sed la antaŭan nokton, mi malsekigis la tutan pulvon en la tendaro de Simono, kaj

¹² senriĉigi ilin 使他们贫穷, 使他们耗尽自己的财富。

¹³ kunigi ilin en unu sama loko 使他们挤住在一块儿。

¹⁴ Tio estas bonega. 这太好了。这很好。

¹⁵ senhăutigi vin 剥你的皮。

¹⁶ difinita tempo 预定的时间。预先约定的时间。

¹⁷ kiel staras la afero 事情的情况怎样? 这句主语是 afero

¹⁸ proponi konkeri la tutan mondon por la reĝo 向国王建议征服全世界。

faris tiom multajn pajlajn soldatojn por la Hinda Reĝo, kiom vi ne povas kalkuli. Kaj kiam la soldatoj de Simono vidis la pajlajn soldatojn ĉirkaŭantaj ilin, ili estis teruritaj. Simono ordonis al ili pafi; sed iliaj kanonoj kaj pafiloj ne volis funkcii¹⁹. Tiam la soldatoj de Simono estis tute teruritaj, kaj kuris kiel ŝafoj, kaj la Hinda Reĝo persekutis ilin. Simono suferis grandan malvenkon. Li estas senigita je sia bieno, kaj morgaŭ oni ekzekutos lin. Restas al mi nur unutaga laboro; mi devas lin ellasi el la malliberejo, por ke li povu forkuri hejmen. Morgaŭ mi estos preta helpi iun el vi, kiu min bezonas.”

Tiam la dua diableto, kiu venis de Taras, komencis rakonti pri sia laboro. “Mi ne bezonas helpon,” li diris, “mia afero iras tute bone. Taras ne povos elteni pli ol unu semajnon. Unue mi faris lin avara kaj pli dika. Lia avareco fariĝis tiel granda, ke li volis aĉeti ĉion, kion li vidis. Li elspezis sian tutan monon, aĉetante grandan kvanton da aferoj, kaj ankoraŭ daŭre aĉetadas. Li jam komencis uzi pruntitan monon. Liaj ŝuldoj nun pendas kiel pezilo ĉirkaŭ lia kolo²⁰, kaj li estas tiel implikita, ke li neniam povas esti liberigita. Post unu semajno venos la tago de liaj pagoj, kaj antaŭ tiam mi malbonigos ĉiujn liajn aĵojn. Li ne povas pagi kaj devos iri hejmen al sia patro.”

Tiam ili demandis la trian diableton, kiu venis de Ivan, “Kaj kiel prosperas via afero?”

“Nu,” li diris, “mia afero iras malbone. Unue mi kraĉis en la botelon de lia kvaso²¹ por dolorigi al li la stomakon,

¹⁹ kanonoj kaj pafiloj ne volis funkcii 枪炮都失去作用了。

²⁰ liaj ŝuldoj nun pendas kiel pezilo ĉirkaŭ lia kolo 他的债务象一个称铊挂在脖子上一样。

²¹ kraĉi en la botelon de lia kvaso 把吐沫吐进他的啤酒瓶里去。en 后面的 botelon 用目的格词尾-n, 表示方向, 是向瓶子里吐进去。

kaj poste mi iris en lian kampon kaj faris la teron malmola kiel ŝtono, por ke li ne povu ĝin plugi. Mi pensis, ke li ne povos ĝin plugi, sed kia malsaĝulo, li venis kun sia plugilo kaj komencis fari sulkon. Li ĝemis pro la doloro en la stomako, sed daŭrigis plugi. Mi rompis lian plugilon, sed li iris hejmen, prenis alian kaj denove komencis plugi. Mi rampis sub la teron kaj kaptis la plugklingon²², sed estis malfacile ĝin teni; li kliniĝis peze sur la plugilo, kaj la soko estis akra kaj tranĉis miajn manojn. Li preskaŭ finis plugi la kampon, kaj restas nur unu sulko. Venu, fratoj, kaj helpu min; ĉar se ni ne venkos lin, nia tuta laboro estos perdita. Se la malsaĝulo daŭrigos terkulturon, liaj fratoj neniam suferos mankon, ĉar li nutros ilin ambaŭ.”

La diableto, kiu kroĉiĝis al Simono la Soldato, promesis veni la sekvantan tagon por helpi, kaj tiel ili disiĝis.

III

Ivan jam plugis la tutan neplantitan kampon krom unu sulko. Li venis por fini. Kvankam lia stomako doloris, tamen li devis plugi. Li delokis la jungrimenon²³, turnis la plugilon kaj komencis labori. Li plugis sulkon, sed revenante li trovis, ke la plugilo komencis ne facile treniĝi, kvazaŭ ĝi estus kaptita de radiko²⁴. Ĝi estis la diableto, kiu tordis siajn krurojn ĉirkaŭ la plugklingo kaj estis ĝin retenanta.

“Kia stranga afero!” pensis Ivan. “Ĉi tie oni nur malofte vidas radikojn, kaj tamen ĉu ĝi estas radiko?”

²² kapti la plugklingon 抓住犁铧, plug-klingo 合成词, 犁铧, 犁刀。

²³ deloki la jungrimenon 取下套马的皮带, 放到别处去。de-loki 是合成词, 放到别处去。jung-rimeno 是合成词, 套马的皮带。

²⁴ esti kaptita de radiko 给树根绊住, 不能前进。

Ivan puŝis la manon profunden en la sulkon, palpadis ĉirkaŭe, kaj, sentante ion molan, kaptis ĝin kaj eltiris. Ĝi estis nigra kiel radiko, sed ĝi sin tordadis. Jen, ĝi estis vivanta diableto!

“Kia malpura estaĵo!” diris Ivan, kaj li levis la manon por ĵeti ĝin kontraŭ la plugilon, sed la diableto fajfkriis:

“Ne vundu min, kaj mi faros ĉion, kion vi volas.”

“Kion vi povas fari?”

“Ĉion, kion vi diras al mi.”

Ivan gratis sian kapon.

“Mia stomako doloras,” li diris, “ĉu vi povas kuraci tion?”

“Certe mi povas.”

“Bone, faru do.”

La diableto sin klinis sur la sulkon, palpadis ĉirkaŭe, gratis per siaj ungoj, kaj eltiris aron da tri etaj radikoj, kiun li donis al Ivan.

“Jen,” li diris, “ĉiu, kiu englutas unu el tiuj ĉi, estos kuracita je kia ajn malsano.”

Ivan prenis la radikojn, disigis ilin, kaj englutis unu. La doloro en lia stomako tuj foriĝis.

La diableto ankoraŭfoje petis pri forlaso; “Mi min ĵetos rekte en la teron, kaj neniam revenos plu,” li diris.

“Bone,” diris Ivan, “iru for, kaj Dio estu kun vi!”

Kaj apenaŭ Ivan menciis Dion, la diableto plonĝis en la teron kiel ŝtono ĵetita en la akvon. Nur unu truo estis postlasita.

Ivan metis la aliajn du pecojn de radiko en la ĉapon kaj daŭrigis sian plugadon. Li plugis la sulkon ĝis la fino, returnis la plugilon kaj iris hejmen. Li maljungis la ĉevalon, eniris la kabanon, kaj tie li vidis sian pliaĝan fraton, Simonon la Soldato, kaj lian edzinon, sidantaj ĉe vespermanĝo. La bieno de Simono estis konfiskita, li mem apenaŭ sin liberigis

el la malliberejo, kaj li revenis por vivi en la domo de la patro.

Simono vidis Ivan'on, kaj diris, "Mi venis por vivi ĉe vi. Nutru min kaj mian edzinon ĝis mi akiros alian oficon."

"Bone," diris Ivan, "vi povas resti ĉe ni."

Sed kiam Ivan estis eksidonta sur la benkon, la sinjorino malŝatis la odoron, kaj diris al la edzo, "Mi ne povas vespermanĝi kun malpura kamparano."

Tial Simono la Soldato diris, "Mia sinjorino diras, ke vi ne odoras bone. Do estos bone, ke vi iru kaj manĝu ekstere."

"Bone," diris Ivan, "ĉiukaze²⁵ mi devas pasigi la nokton ekstere, ĉar mi devas paŝti la ĉevalinon."

Ivan prenis panon kaj sian jakon, kaj iris kun la ĉevalino en la kampon.

IV

Fininte sian laboron dum tiu nokto, la diableto de Simono venis, kiel promesite, por trovi la diableton de Ivan kaj helpi al li subigi²⁶ la malsaĝulon. Li venis al la kampo, kaj serĉis kaj serĉis; sed anstataŭ sian kamaradon li trovis nur truon.

"Certe," pensis li, "io malbona trafis mian kamaradon. Mi devas lin anstataŭi. La kampo estas elplugita, tial mi devas lukti kontraŭ li en la herbejo."

La diableto iris al la herbejo kaj superakvigis la herbokampon de Ivan, kaj tial la tuta herbo kovriĝis de koto.

Ivan revenis de la paŝtejo ĉirkaŭ la tagiĝo, akiris sian falĉilon, kaj iris por falĉi la herbokampon. Li komencis

²⁵ ĉiukaze, ĉiu-kaze 合成词, 意为在各种场合下, 常常。

²⁶ subigi, sub-ig-i 压服, 使屈服。

falĉi, sed apenaŭ li svingis la falĉilon unu aŭ du fojojn, la klingo malakrigis, tiel ke ĝi jam ne tranĉis, kaj li devis ĝin reakrigi. Ivan baraktis dum kelka tempo, kaj poste diris al ŝi, "Nenio helpas²⁷. Mi devas iri hejmen kaj porti ilon por akrigi la falĉilon, kaj mi prenos pecon da pano samtempe. Eĉ se mi devos pasigi unu semajnon ĉi tie, mi ne ĉesos antaŭ ol mi finos falĉi."

La diableto aŭdis tion kaj pensis, "Tiu ĉi malsaĝulo vere min ĝenas; mi ne povas lin subigi laŭ tiu ĉi maniero. Mi devas provi alian rimedon."

Ivan revenis, akrigis la falĉilon, kaj komencis falĉi. La diableto rampis en la herbon kaj ekkaptis la falĉilon je la dorso, kaj puŝis la pinton en la teron. Ivan trovis la laboron tre malfacila, sed li falĉis la tutan herbejon, krom eta terpeco, kiu estis en la marĉo. La diableto rampis en la marĉon, kaj pensis, "Eĉ se miaj manoj estos fortranĉitaj, mi ne lasos lin falĉi."

Ivan atingis la marĉon. La herbo ŝajnis ne tre densa, sed tamen ĝi malcedis al la falĉilo. Ivan ekkoleriĝis kaj komencis svingi la falĉilon kun sia tuta forto. La diableto devis cedi; li jam ne povis teni la falĉilon plu, kaj, vidante, ke li ne povos sukcesi, li grimpis en la densejon. Ivan svingis la falĉilon, enpaŝis en la densejon, kaj fortranĉis duonon de la vosto de l' diableto. Poste li finis falĉi la herbon, diris al la fratino, ke ŝi rastu ĝin, kaj iris mem por falĉi la sekalon.

Li iris kun la falĉilo, sed la vostotranĉita diableto jam estis tie antaŭ ol li, kaj malordigis la sekalon, tiel ke la falĉilo estis senutila. Sed Ivan iris hejmen kaj prenis falĉileton, kaj komencis falĉi per ĝi, kaj li falĉis la tutan sekalon.

"Nun estas tempo," li diris, "falĉi la avenon."

²⁷ nenio helpas 毫无办法, 没有办法了。

La vostotranĉita diableto aŭdis tion, kaj pensis, "Mi ne povis venki lin pri la sekalo, sed mi nepre sukcesos pri la aveno. Nur atendu ĝis la mateno."

En la mateno la diableto rapidis al la avena kampo, sed la aveno estis jam antaŭe falĉita! Ivan estis ĝin falĉinta en la antaŭa nokto, por ke malpli da grajnoj forskuiĝu. La diableto ekkoleris.

"Li fortranĉis al mi la voston kaj ellacigis min — la malsaĝulo. Estas pli malbone ol milito! La malbenita malsaĝulo neniam dormas; oni povas fari nenion kontraŭ li. Nun mi eniros en liajn stakojn kaj putrigos ilin."

Tial la diableto iris al la sekalo, kaj enrampis en la garbojn, kaj ili komencis putriĝi. Li varmigis ilin, kaj mem fariĝis varma kaj ekdormis.

Ivan jungis la ĉevalinon, kaj iris kun la fratino por porti la sekalon. Li venis al la amasoj, kaj komencis meti la sekalon en la ĉaron. Li ĵetis du garbojn, kaj tiam pikis per la forko — rekte en la dorson de la diableto. Li levias la forkon kaj vidas sur ĝia pinto vivantan diableton vostotranĉita, baraktanta, sin tordanta, kaj penanta forsalti.

"Nu, vi malpura estaĵo, vi estas denove ĉi tie?"

"Mi estas alia," diris la diableto. "La unua estis mia frato. Mi estis kun via frato Simono."

"Bone," diris Ivan, "kiu ajn vi estas, vi devas renkonti la saman sorton."

Li estis ĵetegonta lin kontraŭ la ĉaron, sed la diableto ekkriis, "Lasu min for, kaj mi ne nur lasos vin sola, sed mi faros ĉion, kion vi diras al mi."

"Kion vi povas fari?"

"Mi povas fari soldatojn el ĉio ajn."

"Sed al kio ili estas utilaj?"

"Vi povas turni ilin al kia ajn utilo; ili povas fari ĉion laŭ via plaĉo."

“Ĉu ili povas kanti?”

“Jes, se vi volas.”

“Bone, vi povas fari al mi kelkajn.”

Kaj la diableto diris, “Jen, prenu garbon da sekalo, poste ekskuu ĝin rekte sur la tero, kaj simple diru:

‘Ho vi garbo! Mia sklavo

Donas al vi ĉi ordonon:

Jam ne estu garb’ da pajloj

Jen aperu nu soldatoj!”

Ivan prenis la garbon, batis ĝin sur la tero, kaj diris tion, kion diris la diableto. La garbo falis dise, kaj ĉiuj pajloj ŝanĝiĝis en soldatojn, kun trumpetisto kaj tamburisto ludantaj en la antaŭo, tiel ke ekestis tuta regimento.

Ivan ekridis.

“Kiel lerte!” li diris. “Tio ĉi estas bela! Kiel ĝojos la knabinoj!”

“Nun forlasu min,” diris la diableto.

“Ne,” diris Ivan, “mi devas fari miajn soldatojn el draŝitaj pajloj, alie bona greno estos malŝparita. Instruu al mi kiel reŝanĝi ilin en la garbon. Mi volas ĝin draŝi.”

Kaj la diableto diris, “Ripetu:

‘Estu ĉiu ree pajlo

Kiu estis ja soldato,

Ho soldato! Mia sklavo

Donas al vi ĉi ordonon!”

Ivan diris tion ĉi, kaj la garbo reaperis.

Denove la diableto komencis peti, “Nu, lasu min for!”

“Bone.” Kaj Ivan premis lin kontraŭ la flankon de la ĉaro, tenis lin per sia mano, kaj tiris lin el la forko.

“Dio estu kun vi,” diris li.

Kaj apenaŭ Ivan menciis Dion, la diableto plonĝis en la teron kiel ŝtono jetita en la akvon. Nur unu truo estis postlasita.

Ivan iris hejmen, kaj tie estis lia alia frato, Taras kun sia edzino, sidante ĉe vespermanĝo.

Taras la Dikulo ne povis pagi siajn ŝuldojn, forkuris de siaj kreditoroj, kaj revenis al la domo de sia patro. Kiam li vidis Ivan'on, li diris, "Nu, Ivan! ĝis mi povos ree komenci komercon, mi volas, ke vi nutros min kaj mian edzinon."

"Bone," diris Ivan, "vi povas resti ĉi tie laŭ via plaĉo."

Ivan demetis sian jakon kaj altablighis, sed la edzino de la komercisto diris, "Mi ne povas sidi ĉe la tablo kun tiu ĉi malĝentilulo, li odoras ŝviton."

Tiam Taras la Dikulo diris, "Ivan, vi odoras tro forte. Iru kaj manĝu ekstere."

"Bone," diris Ivan, prenante panon kaj irante al la korto. "Ĉiukaze nun estas tempo por mi iri kaj paŝti la ĉevalinon."

V

La diableto de Taras, estinte ankaŭ libera tiun nokton, venis laŭ sia promeso por helpi siajn kamaradojn subigi Ivan'on la Malsaĝulo. Li venis al la grenkampo, serĉis kaj serĉis sian kamaradon — neniue estis tie. Li nur trovis truon. Li iris al la herbokampo, kaj tie trovis la voston de diableto en la marĉo, kaj alian truon en la sekala stoplo.

"Certe, io malbona trafis miajn kamaradojn," pensis li. "Mi devas anstataŭi ilin kaj lukti kontraŭ la malsaĝulo."

Tial la diableto iris por serĉi Ivan'on, kiu tamen jam stakigis la grenon kaj estis hakanta arbojn en la arbaro. La du fratoj jam komencis senti malvastecon, loĝante kune²⁸,

²⁸ komenci senti malvastecon, loĝante kune 住在一起, 开始感到地方太狭了。

kaj ordonis al Ivan haki arbojn por konstrui novajn domojn por ili.

La diableto kuris al la arbaro, grimpis branĉojn, kaj komencis malhelpi al Ivan, ke li faligu la arbojn. Ivan subhakis unu arbon, tiel ke ĝi devis fali senmalhelpo, sed falante, ĝi turniĝis malrekte kaj kaptiĝis inter kelkaj branĉoj²⁹. Ivan tranĉis stangon, per kiu li povu levi ĝin flanken, kaj kun malfacilo sukcesis porti ĝin al la tero. Li komencis haki alian arbon — denove la sama afero okazis; kaj per ĉiuj siaj fortoj li apenaŭ povis faligi la arbon. Li komencis je tria arbo, kaj ankoraŭfoje la sama afero okazis.

Ivan esperis dehaki duonon de cent arboj, sed ne faligis eĉ duonon de dudeko, kaj nun la nokto fariĝis kaj li estis ellacigita. La vaporo el li disvastiĝis kiel nebulo tra la arbaro, sed ankoraŭ li kroĉiĝis al sia laboro. Li subhakis alian arbon sed lia dorso ekdoloris kaj li ne povis stari. Li enpuŝis la hakilon en la arbon kaj sidigis por ripozi.

La diableto, rimarkinte ke Ivan ĉesis labori, fariĝis gaja.

“Finfine,” pensis li, “li ellaciĝis! Li forlasos ĝin. Nun mi mem povas havi ripozon.”

Li sin sidigis forke sur branĉo³⁰ kaj gorĝridis³¹. Sed baldaŭ Ivan leviĝis, elpuŝis la hakilon, svingis ĝin, kaj frapegis la arbon ĉe la kontraŭa flanko per tia forto, ke la arbo tuj cedis kaj falegis kun laŭta krako. La diableto ne atendis³² tion ĉi, kaj ne havis tempon por teni la piedojn for, kaj la arbo rompiĝante kaptis lian manon. Ivan komencis dehaki la branĉojn, kiam li rimarkis vivantan diableton pendantan en la arbo! Ivan estis surprizita.

²⁹ kaptiĝi inter kelkaj branĉoj 挂在几枝树枝上。给几枝树枝挂住了。

³⁰ Li sin sidigis forke sur branĉo... 叉着腿坐在树枝上...

³¹ gorĝridi, gorĝ-ridi 喉内发出怪声。

³² ne atendis 没有料到, 出于预料之外。

“Nu, vi malpura estajo,” diris li, “vi estas denove ĉi tie!”
“Mi estas alia,” diris la diableto. “Mi estis kun via frato Taras.”

“Kiu ajn vi estis, vi devas renkonti la saman sorton,” diris Ivan, kaj svingante sian hakilon li estis preta bati lin per la mantenilo, sed la diableto petis indulgon. “Ne batu min,” diris li, “kaj mi faros ĉion, kion vi diras al mi.”

“Kion vi povas fari?”

“Mi povas fari por vi monerojn, tiom multe kiom vi volas.”

“Bone, faru kelkajn.”

Tial la diableto montris al li kiel fari ilin.

“Prenu,” diris li, “kelkajn foliojn de tiu ĉi kverko kaj frotu ilin en viaj manoj, kaj oraj moneroj elfalos sur la teron.”

Ivan prenis kelkajn foliojn kaj frotis ilin, kaj oraj moneroj faladis el liaj manoj.

“Tio ĉi faros amuzon,” diris li, “al la infanoj en ilia ferio.”

“Nu, lasu min for,” diris la diableto.

“Bone,” diris Ivan, kaj preninte levilon, li liberigis la diableton. “Nun iru for! Kaj Dio estu kun vi,” diris li.

Kaj apenaŭ Ivan menciis Dion, la diableto plongis en la teron kiel ŝtono ĵetita en la akvon. Nur unu truo estis postlasita.

VI

La fratoj konstruis domojn, kaj komencis loĝi aparte; kaj Ivan finis la rikoltan laboron, faris bieron, kaj invitis la fratojn por pasigi la venontan ferion kun li. Liaj fratoj tamen ne volis veni.

“Ni ne ŝatas kamparanan regalon,” diris ili.

Tial Ivan regalis la kamparanojn kaj iliajn edzinojn, kaj li mem drinkis ĝis li estis iom ebria. Tiam li iris en la straton